# TEA-BULTENO

3ª JARO — JANUARO 2000 — NUMERO 1

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| **1** | **S** | *Bonan Novan Jaron!* |
| **2** | **D** | |
| 3 | L | |
| 4 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 5 | M | |
| **6** | **Ĵ** | |
| 7 | V | El **LA PRAKTIKO**: Ekzercoj |
| 8 | S | |
| **9** | **D** | |
| 10 | L | h. 17 - Legemuloj kunvenas |
| 11 | M | Ordigo de hemeroteko |
| 12 | M | |
| 13 | Ĵ | |
| 14 | V | Januaruloj festas! |
| 15 | S | |
| **16** | **D** | **Ĝenerala Asembleo de TEA** |
| 17 | L | h. 17 - Legemuloj kunvenas |
| 18 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 19 | M | |
| 20 | Ĵ | Unuagrada kurso de Esperanto |
| 21 | V | Ludkarta vespero |
| 22 | S | |
| **23** | **D** | |
| 24 | L | h. 17 - Legemuloj kunvenas |
| 25 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 26 | M | |
| 27 | Ĵ | Unuagrada kurso de Esperanto |
| 28 | V | Interŝanĝo de bildkartoj el la tuta mondo |
| 29 | S | |
| **30** | **D** | |
| 31 | L | h. 17 - Legemuloj kunvenas |

## *Nova Jaro*

venis. La homoj rapidas diri unu al la alia: «Mi deziras al vi feliĉan novan jaron!» Kaj ili atendas, ke la nova jaro portos al ili bonon kaj feliĉon.

Ankaŭ ni, esperantistoj, povas demandi: «Kion portos la nova jaro al ni kaj al nia movado?» La respondo estas simpla: Nenion! La jaroj estas malplenaj tempoj. Ili portas nenion. Sed ni, homoj, devas plenigi la jarojn per niaj agoj. Do la nova jaro portos tion, kion ni mem faros dum ĝi. Sciante, ke la enhavo de la nova jaro dependas de ni, sciante, ke ni estas faktoroj en la vivo de la homaro kaj en la historio de la mondo, ni sentu respondecon pri niaj agoj kaj en la komenco de la nova jaro ni pripensu niajn taskojn kaj devojn.

La sorto donis al ni la privilegion ekvidi, ke la mondo estas malsana. El tiu ekvido sekvas por ni la devo: provi kuraci la malsanan mondon. Kaj ni povas esti feliĉaj kaj fieraj, ĉar en niaj manoj estas bonega kuracilo: la internacia lingvo. Ni apliku ĉi tiun grandiozan medikamenton, ni disvastigu la admirindan lingvon de Zamenhof, por ke la disigitaj partoj de la homaro baldaŭ interkompreniĝu kaj en interkonsento faru pli bonan ordon en la mondo. Tio estis la deziro de d-ro Zamenhof kaj tio devas esti la programo de ĉiu esperantisto. En la nova jaro ni ne nur revu kaj esperu, sed ankaŭ laboru. Kion ni faru?

Niaj «verdaj beboj», la novaj esperantistoj, diligente ekzercu la lingvon kaj rapide kresku en Esperanto. La malnovaj esperantistoj perfektigu la komencantojn, instruante al ili la lingvon kaj enkondukante ilin en la spirito de la Esperanta idealo. Kaj ni ĉiuj, komencantoj kaj progresintoj, disvastigu nian lingvon en la granda publiko, farante energian propagandon.

La nombro de la esperantistoj estas granda, sed en komparo kun la nombro de la neesperantistaj homoj ĝi estas ankoraŭ tre malgranda. Do, ni havas vastan laborkampon. Ni plugu ĝin energie kaj ni semadu senlace. Nia programo por la nova jaro estu: **Dum la nuna jaro la nombro de la esperantistoj duobliĝu!**

Ĉu tio estas malfacile atingebla? Tute ne! Ni tre facile kaj rapide atingus tiun rezulton, se ĉiu esperantisto varbus nur unu novan esperantiston. Ni esperas, ke ĉiu leganto tuj faros tiun decidon kaj plenumos ĝin dum la nova jaro.

Ĉi tiu jaro estu jaro de energia laboro kaj jaro de multaj gravaj sukcesoj kaj granda progreso por la lingvo Esperanto!

*Ĉu vi divenis, en kiu jaro estis skribita ĉi tiu teksto? Kiu ĝin skribis kaj kie ĝi aperis? Jen la solvo de la enigmo:* ***Jaro 1933 - Andreo Cseh - LA PRAKTIKO****. Do, antaŭ 67 jaroj, sed ĉio validas ankoraŭ nun, ĉu ne? Nu, ni klopodu realigi, almenaŭ parte, la revojn de tiu emi-*

*nenta esperantisto, kies tuta vivo estis dediĉita al niaj komunaj lingvo kaj idealo. Tuta jaro staras antaŭ ni, kaj ni tuj komencu nian laboron, enkadre de* ***Kampanjo 2000.***

*La* ***20an de januaro*** *startos unuagrada kurso: por ke la klopodoj, financaj kaj homaj, de* ***Katedro*** *kaj* ***Tea*** *ne restu senrezultaj, ankaŭ vi agu, propagandante ĝin inter la amikoj, amikoj de la amikoj, konatuloj ktp ktp. Ĉefe de novaj lernantoj (kaj sekve de novaj anoj) dependas la pluvivo de nia/via Asocio.*

*Kaj nun ni transsaltu en nuntempon, por primediti la vortojn de la Prezidanto de* ***Uea, Kep Enderby.***

## Novjara Mesaĝo

La simbole kaj emocie grava jaro 2000, ĉesojla al nova miljaro, donas al multaj homoj - signife pli ol aliaj jarkomencoj - emon kontempli la pasintecon, same kiel la estontecon. Cedante al la sama emo je tiu ĉi historia fojo, mi kaptu la okazon paroli - mi esperas, ne tro filozofie - pri kelkaj aspektoj de nia movado, de nia komunumo kaj de UEA mem, laŭ miaj observoj kaj spertoj dum mia ĝisnuna tempo kiel prezidanto de UEA.

Je la fino de la 20a jarcento, eĉ se la revoj de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri, ke la fenomeno Esperanto sendube sukcesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento, kies konjunkturoj certe ne helpis prosperi ideojn similajn al la nia.

Ni ofte aŭdas akuzajn demandojn: kial ni ne atingis pli? kial la entuziasmo kaj optimismo de niaj pioniroj plejparte velkis? Sed mi respondas per demando: ĉu ni vere rajtis atendi pli ol tio kion ni jam atingis? Se ni rerigardas al nia historio, la honesta respondo devas esti: ne, atendi pli estis utopie kaj tro optimisme.

Tamen, mi forte kredas, ke ni rajtas eniri la novan jarmilon optimisme kaj kuraĝe, eble ne kun la espero atingi la samajn celojn, almenaŭ ne sammaniere kiel volis la pioniroj, ĉar iliaj celoj probable ne plu aktualas en la nuna mondo, tiom malsama al la ilia. Frontas nin, nuntempajn esperantistojn, tute alia mondsituacio. Konforme al ĝi, ankaŭ ni mem, niaj organizoj, niaj sintenoj kaj strukturoj devos ŝanĝiĝi. Fakte, en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo ĉiuj organizoj kiuj volas ĝin iel servi, devas konstante sin reformi.

Ne konvenas, en novjara mesaĝo, profunde trakti pri tio, kiaj politikaj, taktikaj aŭ strategiaj ŝanĝoj estas dezirindaj, ekzemple, por UEA. Laŭlonge de la jaro, mi klopodos stimuleme fari kelkajn publikajn sugestojn. Konsekvencajn kritikojn kaj ideojn de ĉiuj interesatoj mi bonvenigas. Tamen, mallonge kaj esence: kiajn problemojn de tiu speco mi vidas? Fundamente gravas la fakto, ke dum la lastaj jaroj la ĝenerala publiko, precipe gejunuloj, ne multe interesiĝas pri Esperanto. Tio rezultas de la ĉiuhora inundo de tiel nomataj novaĵoj kaj komercocelaj allogaj distraĵoj, kiujn la nuntempa publiko tutmonde konstante spertas, kun sinteno ofte priskribita kiel apatio. Esperanto de longe ne kvalifikiĝas kiel inda novaĵo, kaj certe ne kiel komerca logaĵo. Nia idealismo en la moderna mondo klare ne plu sufiĉas sola.

Ni ankaŭ devas kalkuli kun tio, ke la antaŭjuĝoj kaj skeptiko de multaj elituloj kontraŭ ni daŭre restos.

Malgraŭ ĉio tio, nia unika Esperanta kultura vivo daŭre pliriĉiĝas kaj kvalite plialtiĝas. Nur unu ekzemplo: konstante eldoniĝas literaturaj verkoj altkvalitaj, tradukitaj kaj originale verkitaj.

Por progresigi nian aferon, ĉiu sin demandas: kion ni faru? Mia unua kaj plej ĝenerala sugesto estas, ke ni strebu plifortigi nian internacian enton de kohereco, sed ne en spirito sekteca, maltolerema aŭ ofenda al aliaj, ĉu esperantistoj aŭ ne.

Due, por socia asocio kiu volas agi efike, ege gravas, evidente, la propra strukturo. Strukture UEA, same kiel ĉiuj internaciaj organizoj, havas multajn problemojn jam pro la fakto mem ke ĝi laboras internacie. La komitatanoj kaj estraranoj de UEA, kvankam statute ili havas la superan gvidrolon en la aferoj de UEA, necese impresas pli malfortaj kaj iom pli amatoraj ol la profesiuloj en la Centra Oficejo, ĉar la unuaj laboras en sia libertempo, dise tra la mondo. Tia kontraŭdira situacio kreas seriozajn problemojn - kiel en ajna asocio celanta agi kaj efike kaj demokratie - pri la kombino de efika gvidado kun efektivaj, ĝustaj, demokratiaj principoj de respondeco. Bedaŭrinde, akcepteblajn solvojn ne facilas trovi.

Trie, ni devas akcepti ke, kvankam la interpopola lingva problemo mondskale ege gravas, ĝi plejparte ne interesas la ordinarajn homojn.

Do, ree: kion fari? Mi sugestas ke, daŭre disvastigante la uzon de Esperanto per niaj tradiciaj metodoj, ni pliaktiviĝu en aliaj statute permesitaj aferoj, ekzemple, batalante por homaj rajtoj ĝenerale.

Kvankam pri certaj temoj ligas nin statute deviga neŭtraleco, la statuto permesas al ni, fakte eĉ kuraĝigas nin, tion fari. En niaj tiukampaj klopodoj, ni strebu malpligrandigi la distancon inter la «skoloj» por- kaj perespernantaj de nia tuta movado kaj komunumo, kaj pli alproksimiĝi al la peresperanta flanko.

Sendepende de la demando de neŭtraleco, decidi pri la plej bonaj, saĝaj kaj prudentaj reagoj al multaj dornaj demandoj ĉiam restos problemo. Mi kredas ke, post pli ol cent jaroj, ni jam estas sufiĉe maturaj fari taŭgajn decidojn.

Ni ĉiuj ankaŭ iĝu pli toleremaj al la multaj diferencaj opinioj kaj tendencoj en ĉiuj vicoj de nia komunumo, kaj ni atente aŭskultu niajn kritikistojn.

UEA ne estas, kaj ne volas esti, la fonto de ĉiuj saĝoj pri la plej bonaj manieroj progresigi Esperanton kaj, pere de Esperanto, helpi la bonstaton de la mondo. Inkluzivemo, akceptemo, toleremo al ĉiuj fluoj de opinioj estu nia devizo.

Geamikoj, mi ne intencas prediki al vi. Fiere, memfide kaj ĉiatendence, ni marŝu antaŭen.

Mi deziras, ke ĉiuj havu feliĉan novan jaron.

## Esperanta Turisma Societo Ljubljana

**Januara programo** - Ĉiuĵaŭde je la 19.30 h.

| | |
|---|---|
| **06.01** | Libera vespero |
| **13.01** | Novaĵoj el esperanta gazetaro |
| **20.01** | Lingva vespero |
| **27.01** | Diapozitivoj pri adriaj urboj - 2a parto |

## Al la jaro 2000 per serioza engaĝigo

ITALA ESPERANTO-FEDERACIO intensigis sian aktivadon per starigo de serio da komisionoj, kun la celo envolvi en sian agadon kiel eble plej da italaj esperantistoj, proponante diversajn kampojn, en kiuj ĉiu povos trovi sian plej konvenan laŭ propraj intereso kaj specialiĝo.

Du estas la ĉefaj celoj:

1) trovi respondeculon pri ĉiu aktivad-kampo por ĉiujare kontroli la progresojn en tiu specifa fako, certigante al li/ŝi mem maksimuman aŭtonomion en la agado.

2) Subdividi, laŭ la fakoj, la laborojn de la IEF-estraro por ke la aktivuloj povu mem elekti en kiu kampo sin engaĝi; akiri la maksimumon el la laboro de estraranoj, limigante la agad-kampojn; plialtigi la nombron de agemuloj, donante la eblon labori en bone difinita kampo, laŭ iliaj interesoj, en funkcianta strukturo kaj kun precizaj celoj.

Komisionoj kaj relativaj respondeculoj jam ekfunkcias, sed malmultnombras la aktivuloj. Nun estas via vico: en kadro pli bone organizita, kun klaraj ideoj en la kapo, obstine rigardantaj al la celo, certe ankaŭ vi trovos vian lokon por realigi tion, kion ankoraŭ vi ne kapablis konkretigi ĉar sen kunlaborantoj. Donu vian kontribuon por alfronti la novan miljaron bone ekipitaj kaj per taŭgaj bataliloj.

Jen la starigitaj komisionoj:

Pri informado: Fabrizio Pagliaroli pagliaroli@speednet.it

Pri instruado kaj rilatoj kun ILEI kaj IIE: Laura Brazzabeni lbrazza@libero.it

Pri renkontiĝoj: Edvige Tantin Ackermann - nored@iol.it

Pri Literaturo: Nicolino Rossi

Pri kontaktoj kun Eŭro-parlamentanoj: Umberto Broccatelli - u.broccatelli@tiscalinet.it

Pri serĉado de financaj subtenoj: Giorgio Pagano g.pagano@archiworld.it

Pri rilatoj kun UEA: Renato Corsetti - corsetti@itelcad.it

**Post laboro, venas la distra kaj ripoza parto, tial sur la kalendaro de la jaro 2000, jam nun notu ruĝkrajone la partoprenindajn eventojn de nia movado:**

### 85ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**Tel-Avivo (Israelo) - 25 julio - 1 aŭgusto 2000**

La lando Israelo proponas preskaŭ senliman gamon de allogaĵoj por vizitantoj el la tuta mondo kaj por la kredantoj de pluraj religioj. Ĝia historio etendiĝas tra 4000 jaroj, dum kiuj la historioj de la Biblio ofte miksiĝas kun la pejzaĝoj kaj urboj videblaj ankaŭ nuntempe. La plej elstara el tiuj estas Jerusalemo, antikva kaj moderna metropolo, kie oriento kaj okcidento renkontiĝas, antikvo miksiĝas kun moderno.

Vizito al Jerusalemo, sankta urbo al la mondaj monoteismaj religioj - Judaismo, Kristanismo kaj Islamo - estas malkovro de la arkitekturoj de grandaj imperioj, esploro de sanktejoj, trovo de antikvaĵoj kaj historiaj restaĵoj, atestantaj pri ĝia granda heredaĵo.

La vizitantoj de Israelo povas sekvi la piedsignojn de Abrahamo, Jesuo, Rikardo Leonkora, Napoleono kaj tiom da aliaj herooj de la pasinteco, kies nomo kaj spirito ekscitas la imagon; ili povas naĝi en la Lago de Galileo, admiri la fortikaĵon de Masado, en la plej malalta tereno de la mondo flosi sur la akvo de Morta Maro, kaj spekti la subakvan paradizon de la Ruĝa Maro en Eilat.

La moderna Israelo ofertas ankaŭ alispecajn fascinajn trajtojn: la kibucon, unikan kontribuon al komunuma loĝado; internaciajn vivoplenajn urbojn kaj belajn, tre variajn pejzaĝojn; altteknologiajn industriojn, universitatojn kaj esplorcentrojn. Ĉio ĉi troviĝas en lando facile atingebla aere, kiu estas facile kombinebla kun aliaj vojaĝoceloj.

Pri la kongresa urbo: **Tel-Avivo** (oficiale: Tel-Aviv-Jafo), fondita en 1909, estas la plej moderna urbo de Israelo, hejmo de komerco, kulturo kaj distro, urbo vigla tage kaj nokte, kiu pravigas sian devizon «La urbo, kiu neniam dormas». Sed preter sia pulsanta ritmo kaj riĉa elekto de aktivadoj, Tel-Avivo estas feria metropolo, kun longaj, puraj, facile atingeblaj sablaj strandoj, marborda promenejo, haveneto kaj intensa gamo de aktivadoj, kreitaj por kompletigi la ĝuon de la varmeta maro. La nokta vivo viglas en sennombraj drinkejoj, tavernoj, kafejoj, restoracioj, noktokluboj kaj dancejoj, multaj el ili malfermitaj ĝis frumatene. Tel-Avivo estas ankaŭ aĉetemula paradizo, kie eblas trovi ĉiuspecan varon importitan al aŭ produktitan en Israelo. Ĉe Tel-Avivo troviĝas la antikva urbo Jafo, restaŭrita en 1953, kun siaj antikva haveno, pulbazaro, kaj bunta bukedo el galerioj, memoraĵbutikoj, restoracioj kaj la artista kvartalo en la Malnova Urbo.

Jen la kongresejo: la hotelo kaj kongrescentro «Dan Panorama», ĉe la mediteranea marbordo, vid-al-vide al belegaj pejzaĝoj de la antikva Jafo kun ĝia pitoreska haveno en la sudo, la turisma marbordo de Tel-Avivo en la nordo, kaj la apudaj parko kaj nova komerca centro. Nur promen-distance troviĝas la Ŝalom-Turo kaj la nova Operej-butikumejo. La hotela kongrescentro havas multajn restoraciojn, bufedejojn kaj diversgrandajn salonojn, kaj kongresan salonegon kun 2500 sidlokoj. Krome ĝi disponigas naĝejon, plene ekipitan gimnastik- kaj sportcentron, saŭnon, masaĝ-banejon ktp.

Esperanto-Ligo en Israelo invitas vin al Tel-Avivo. Kongresumado kaj turismado en nia unika, nov-malnova lando havigos al vi neforgeseblajn spertojn.

*Eldad Salzman - eldad@netvision.net.il*
Esperanto-Ligo en Israelo - P.O.K. 1289
IL - 61012 Tel-Avivo (Israelo)

→ Kaj - en Italio - ne forgesu pri la

### 69ª Itala Kongreso de Esperanto

**Casalecchio di Reno (Bologna) 26-30 aŭgusto 2000!**

Temo - Esperanto en la Tria Jarmilo: kiaj perspektivoj? Inaŭguro kaj bonveniga vespero ĉe *Teatro Testoni*, dum la kongresaj laboroj okazos en la Hotelo *Calzavecchio*, samloka tranoktejo de la esperantistaro.

La interkona vespero disvolviĝos en gaja etoso kaj - ĉefe - oni havos la eblecon gustumi bongustaĵojn de la bolonja kuirarto.

Estas antaŭvidite ke la Forumon pri la kongresa temo ĉeestos eminentuloj.

Rilate al la distra parto, oni jam enprogramigis vizitojn al la manifestacioj pri «Bolonjo 2000, eŭropa kultura ĉef-urbo», al la muzeo pri Guglielmo Marconi, al Porretta Terme, Ravenna kaj San Marino.

Fine de novembre la enskribiĝintoj jam estas pli ol cent, inter kiuj multaj eksterlandanoj. Sed en preparo kromaj surprizoj!

Por pliaj informoj, je dispono: Daniele Agostini
beg.Tellini1912@esperanto.nu

# Ordinara Asembleo de TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos dimanĉe la **16an de januaro 2000 je la horo 9.30 en unua kunvoko kaj respektive je la 10a en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 1999.
   a) Morala raporto de la prezidanto *(E. Ackermann)*
   b) Agadraporto de la sekretario *(E. Doerfler)*
   c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(G. Valle)*
   ĉ) Deklaracio de la revizoroj *(A. Zerpini - E. Nocent)*
   d) Raporto de la triesta katedro *(E. Doerfler)*
   e) Raporto pri la libro-fako *(G. Valle)*
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.



### Kaj kio post la Asembleo???

Dimanĉmatena laborado, streĉaj horoj intense dediĉitaj al solvo de problemoj rilate aktivecon kaj pluan ekzistadon de nia asocio meritas taŭgan premion. Sekve, jen denove

**Susy kaj Silvio**

plezurigos Vin per la

**1a Komuna Tagmanĝo de la 2000a Jaro**

Tuj antaŭmendu vian sidlokon, ĉar jam pluraj anoncis sian ĉeeston: ne risku maltrafi la okazon denove gustumi la frandaĵojn zorge preparitajn de nia ĉefkuiristo!!!

## OSIEK-PREMIO 1999

OSIEK

En 1999 estis proponitaj 18 verkaĵoj premiindaj: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de LA GAZETO. La 23an de julio 1999, dum la IEK en Metz, Francio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

**Xie Yuming**

pro elĉinigo de romanego de *Cao Xuequin* kaj *Gao E.*

### Ruĝdoma Sonĝo

La premio, 400 eŭroj, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro. Informoj ĉe: LA GAZETO, 55210 Creuë kaj http:osiek.org

### El Proverbaro Esperanta

Dion fidu, sed senfare ne sidu.
*Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron.*
Peko kaj eraro estas ecoj de l'homaro.
*Apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla.*

L.L. Zamenhof




# Kien ni iros?

En la 2000a jaro TEA ne plu havos sidejon! Pro renovigo de la tuta domo en *Via Crispi 43*, ĝia posedanto ĉesigas la lukontrakton kaj sekve ni troviĝos... surstrate.

Ke la problemo estas tre, tre serioza, certe vi ĉiuj ja plenkonscias, sed ni kune provu prikonsideri ĉiujn malbonajn flankojn de la nuna situacio.

Ekde sia fondiĝo, Tea preskaŭ ĉiam sukcesis akiri por si sidejon, lue aŭ sublue, aŭ eĉ sub-sub-lue: en foraj jaroj fakte ni havis la eblecon kunveni, dum iuj antaŭkonsentitaj tagoj, en ĉambro je nia kompleta dispono; ni havis sufiĉan spacon por meti la arkivon, kiu nun estas ege ampleksa - ja vi devas konsideri ke nia TEA naskiĝis en la jaro 1906, kaj ke bonŝance nur parto de niaj valoraj historiaĵoj estis konfiskita aŭ perdita dum la diversaj eventoj de la unua kaj dua mondmilitoj.

Intertempe ni kreskis, nia biblioteko - kies tuta enhavo estos baldaŭ finfine enkomputiligita - pli kaj pli riĉiĝis je libroj kaj libroj (baldaŭ ni ekscios la finan numeron - oni kalkulis pli ol 1300 volumojn!), nia hemeroteko preskaŭ krevos; plie ni posedas meblaron, presaparaton ktp ktp. En la periodo daŭranta 10 jarojn, dum kiu ni havis nur por ni tutan loĝejon, ni vivis feliĉe, kun espero ke neniam plu ni devos translokiĝi. Sed bedaŭrinde vane ni esperis! Ĉar nun denove aliloken ni devos iri.

Sed la ĉefa problemo ne kuŝas en la fakto ke ni devas ĉion enpakigi, kaj ĝin transporti en alian ejon, la problemo estas trovi la lokon kie enloĝiĝi. Ja pluraj agentejoj pri konstruaĵoj lu-ofertas loĝejojn, sed kontraŭ kiom da mono? Eĉ ne imageblas kiom da oni postulas por ĉiu monato. Kaj nia asocio ne havas sufiĉan financan forton por elteni tiomon. Ĝi ja vivas danke al mondonacoj, al regiona aŭ provinca aŭ komunuma subtenado (se ni okazigas ion, ĉu ne!), kaj certe estas konate, ke la jaraj kotizoj de la asocianoj povas kovri nur trimonatan lukostojn de nia aktuala sidejo.

Kaj nun? Se ni ne trovos taŭgajn ejojn, je eltenebla prezo, la pluvivado de nia asocio estos endanĝerigita: ĉu vi permesos tion? Ĉu vi permesos ke Triesta Esperanto-Asocio, unu el la plej malnovaj en tuta Italio, ĝuste en la jaro 2000a, je unu paŝo antaŭ la sojlo de la tria jarmilo, malaperu kaj ke ĝia tuta havaĵo disperdiĝu, Dio scias kien? Do, ni alvokas vin ĉiujn, petante vian kunlaboron kaj aktiviĝon por trovi sidejon kie pludaŭrigi nian laboron favore al Esperanto. Sidejon, kiun ni povas elteni finance, kompreneble. Ĉiuj asocianoj, simpatiantoj, amikoj de l'amikoj povas helpi en tio: bonvolu esplori, demandi, enketi: io devas aperi ĉe la horizonto.

Ni ne povas imagi ke ĝuste nun nia aktiveco fariĝu nula pro manko de ejo kie labori, instrui, prepari aranĝojn, program-vesperojn, babiladi....

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349